# SVISA ESPERANTO-SOCIETO
## INFORMAS

N-ro 1/1995 JANUARO-FEBRUARO


## SES-KOTIZOJ 1995, ALVOKO DE LA KASISTO

En tiu-ĉi eldono de SES INFORMAS vi trovas enpagilon (653677-40) por pagi vian kotizon aŭ abonon.

Sed nature ankaŭ donacoj ĉiam estas bonvenaj!

Pro tio bonvolu nepre indiki sur la enpagilo kion vi pagas, do ekzemple:

"Kotizo 1995", aŭ "Abono 1995", aŭ "Donaco"

KOTIZOJ: Inkluzivas abonon al LITERATURA FOIRO kaj SES INFORMAS.


| | | |
|---|---|---|
| Infanoj ĝis 18 jaroj | SFR | 6.- |
| Junuloj ĝis 26 jaroj | " | 35.- |
| Emeritoj, Pensiuloj | " | 35.- |
| Geezoj emeritaj | " | 55.- |
| Ceteraj membroj | " | 60.- |
| Geezoj | " | 90.- |
| Dumvivaj membroj | " | 1200.- |
| Dumvivaj membroj emeritaj | " | 700.- |
| Abonantoj sen membreco (ricevadas nur SES INFORMAS) | " | 35.- |

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj pere de baldaŭa pago subtenas niajn klopodojn servi al vi!

Via Ernst von MAY

oo O oo

# 1995



Per la sonoj de la sonoriloj anoncîĝas la nova jaro. Ĝi alportu pacon kaj harmonion al ĉiuj homoj.

Ankaŭ ni deziras al niaj membroj kaj geamikoj ĉion bonan kaj 365 feliĉajn tagojn.

La estraro de la Svisa Esperanto-Societo
kaj la Redakcio de SES INFORMAS

ooOoo

**PETO DE LA REDAKTORO:**

Membroj, kiuj ŝanĝas sian adreson, estas petataj ne forgesi, ke ankaŭ la kasisto nepre bezonas tian informon. Dankon. -FL-

## B O N V O L U   A T E N T I

En la nuna SES INFORMAS 1/95 vi trovas enpagilon kun la konto-numero 653677-40. Ĝi estas por pagi la SES-kotizon (rigardu sur paĝo 1).

En novembro 1994 vi ricevis flavan SES INFORMAS 6a/1994. En ĝi troviĝis enpagilo kun la konto-numero 653677-40-1. Ĝi estis, estas aŭ estos **senescepte** por kontribuoj al la konto "**AGADO 2003**". Tial bone atentu kaj ne pagu per tio la kotizon, ĉar tio kaŭzus multe da kromlaboro ne nur al la kasisto, sed ankaŭ al la banko. Dankon pro via atento.

-FL-

oo0oo

## ESTIMATAJ SVISAJ GESAMIDEANOJ

Mi estas 62-jara pensionita instruisto. Estus ĝojo por mi trovi korespondamik(in)on en Svislando. Mi interesiĝas precipe pri poŝtmarkoj. Mia adreso estas:
S-ro Sri Soedono Pr, J1,
Suryoputran 41,
Yogyakarta 55131 (Indonezio).

Mi dankas jam antaŭe.

oo0oo

**RETROSPEKTIVO**

Denove jaro pasis. Estas certe bona kaŭzo momenton rerigardi al la 12 pasintaj monatoj.
Antaŭ mi kuŝas la jarkolekto de SES INFORMAS 1994. Diversaj pensoj turniĝas en mia kapo. Demando post demando aperas kaj mi imagas vidi antaŭ mi la multajn legantojn. Ĉu ili ĉiuj estas kontentaj pri nia interna organo? Relegante la reagon de membroj, mia konscio trankviliĝas. Respeguliĝas el diversaj linioj danko kaj kontenteco. Tamen, ne estas facila tasko eldoni informilon, kiu kapablas plenumi la kontentecon de ĉiu leganto.
Mi klopodas krei ion, kio koncernas ne nur Svislandon. Vidite el la vidpunkto de Esperanto ankaŭ okazaĵoj en najbaraj landoj povas altiri la intereson de svisaj legantoj. Mi diras "najbaraj landoj", sed kie estas do la limo? Kiel oni reagu al petoj el tuta Eŭropo aŭ eĉ el pli malproksimaj landoj? Iamaniere oni devas trovi solvon. Proverbo diras: "Kiu havas la elekton, tiu havas ankaŭ la turmenton". Certe la kvalito de aranĝo ludas gravan rolon. Tial mi opinias, ke ĵeto de rigardo trans la horizonton ne estas malbona signo.
AMPLEKSO: Ankaŭ la amplekso de SES INFORMAS estas tikla punkto.Unuflanke oni opinias, ke 8 paĝoj sufiĉas aŭ eĉ estas ideala amplekso, dum aliflanke oni ŝatas pli dikan ekzempleron. Miaopinie ne estas saĝe esti tro pedanta. La disponebla materialo ludas gravan rolon.
En la pasinta jaro mi klopodis,sur 92 paĝoj prezenti eldonon adaptitan al la pokaza situacio kaj tio ŝajnas esti akceptabla normo.

Kostoj: La financan punkton oni ne rajtas neglekti. Estas klare, ke ekzemple 20 aŭ 24 paĝoj kostas konforman prezon. Tial estas plej bone strebi al meza vojo. Ĝis nun mi sukcesis resti ene de la budĝetita sumo. Danki mi ŝatas al ĉiuj, kiuj disponigis da tekstoj. Al la grupoj mi dankas pro la kontribuoj al la parto "GRUPAJ INFORMOJ". Mi tre ŝatus havi la bonan kontakton ĉiuflanke ankaŭ en la nova jaro 1995.
Dankon al ĉiuj. -FL-

oo0oo

**LA ĜENERALA KUNVENO DE SES** okazos, je la 11-a de marto 1995, en **LUZERN.**
Bonvolu noti tiun-ĉi daton kaj rezervu la tagon por SES. Detalaj informoj aperos en SES INFORMAS 2/95. Dankon. -FL-

**KORESPOND-PETO**

Mi estas 40-jara inĝeniero. Min multe interesas Svislando. Esperante trovi iun, kiu pretas korespondi kun mi, pri diversaj temoj, mi dankas jam antaŭe kaj kore salutas.
Mia adreso estas:
Jery Michalski
ul. Pocztowa 9
PL-26-660 Jedlinsk (Polujo)

oo0oo

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En restoracio Riehentorhalle.
26.1.20.00h ĝenerala kunveno
23.2.20.00h Monata kunveno: Nicole Béroud-Focke prelegos pri "IRLANDO", kun lumbildoj.

**BELLINZONA:**
Ĉiam sabate en Viale Motta 32.
14.1.17.oo Lumbildprelego pri FLANDRUJO.

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
3.1.19.30h kaj 7.2.1930h.

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
Ĉiun vendredon 18.00-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**
En Popoldomo salono 7, Chauderon 5.
9.1.20.00h S-ino **Marie Hunninck** el Carpentras, Francujo, parolos pri "skiza prezento pri morala kaj teknika historio de la vestaro"
6.2.20.00h Ĝenerala kunveno.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**
7/8.1. Sabato kaj dimanĉo: **"Kiel vendi Esperanton al la Svisa Publiko?"** Seminario en la hotelo STEGHOF Luzern,sub gvido de s-ro Marco Picasso.
11.1.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big Ben.Gvido Granz Brügger.
26.1.19.30h 30-minuta paroliga kunveno sub gvido de Franz Brügger.
20.00h Libera babilado
20.20h Interŝanĝo de informoj
20.45h Informo pri la seminario, kiu okazis en Hotelo Steghof
21.00h Kunsido de la estraro.

8.2.14.00-16.00 Paroliga kunveno en Big Ben. Gvido Franz Brügger.
16.2.20.00h En restoracio SIMPLON, ĝenerala kunveno. Laŭ propra invito.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTO-GRUPO "LA STELO" GENÈVE:**
En Institut Nacional Genevois.
13.1.18.45h Libropruntado el la grupa biblioteko
19.15h Prelegos Joĉzo Tomaszczyk pri. "kuracplantoj kaj iliaj nomoj"
10.2.18.45h Monata kunveno.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Unt.Bahnhostr18.
11.1.20.00h Postkongreso de la 79-a UK en Kioto-Japanio. Rakontos B.S. Pochanke (kun lumbildoj).
8.2.20.00h Per transsiberia trajno al Pekino kaj 50-a junulara kongreso en Koreio. Rakontos Veronika Pochanke. La renkontiĝo okazos en la loĝejo de familio Pochanke, Lettenstr.70, Wil.

**ESPERANTO-SOCIETO TUERICH:**
9.1.19.00h Monata Kunveno en Karl der Grosse. Programo fiksota.
30.1.19.00h Libera Kunveno ĉe fam. Weidmann, Eisengasse 22. Tramoj 2 aŭ 4 ĝis haltejo Kreuzstrasse.
13.2.19.00h Ĝenerala kunveno en Karl der Grosse. Tagordo sekvos. Proponoj devas atingi la estraron ĝis plej malfrue la 30-a de januaro 1995.

oo0oo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

# NOVA GERMANA LERNOLIBRO

**Post la sukcesa eldono de tri modernaj lernolibroj, en la franca, hispana kaj itala, kaj de la perfektiga kurso de William Auld "Paŝoj al plena posedo" (ses eldonoj: kune, ĉ. 30 000 ekzempleroj), "Heroldo de Esperanto" baldaŭ eldonos elstaran lernolibron por german-lingvanoj: aŭtoro estas d-ro Till Dahlenburg.**

**La nova 200-paĝa verko baziĝas sur la plej aktuala lingvo-pedagogia metodiko kaj konsistas el 15 lecionoj kun vortaretoj, ŝlosiloj, bibliografio, antologio, informoj pri la praktika apliko de Esperanto en diversaj fakoj, informoj pri Esperanto-gazetaro kaj baza literaturo, adresaro de la Movado en Germanio, Aŭstrio kaj Svislando, k.t.p. La verko estas destinita al kursanoj kaj memlernantoj.**

**Ĉiu leciono dividiĝas en ses partojn:**

**I. Kohera teksto, daŭrigata de leciono al leciono, kun vort-klarigoj; II. Demandoj pri la teksto; III. Gramatikaj klarigoj; IV. Dialogo pri temeto el la teskto; V. Ekzercoj pri la traktitaj gramatikaĵoj; VI. Aldonaj tekstoj por libervola legado.**

-HdE-

**La lernolibro aperos en somero 1995.**

oo0oo

Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 2/95 estas la 6-a de februaro 1995.